Li kiel ano de aeroklubo deziras scii ĉu Esperanto posedas leksikon por aeronautiko. Mi demandas la serĉilon per kelkaj klavofrapoj. Respondo rapide aperas: eldoniĝis en 1941 iu “Aeronautika Terminaro” kies aŭtoro estis E. D. Durrant; plie en 1948 la sama kun Turner eldonis duan version kun aldono de la Sveda lingvo.

Ni daŭrigas nian enketon super la VM, sed, konstatante la tempopason, ni bedaŭre kontentiĝas per okul-ĵeto al la belaj kovriloj de libroj el la tuta mondo kaj el ĉiuj tempoj. Ni preterpase ekvidas allogajn traduk-titolojn far Kalocsay el la antikvaj greka kaj latina: tie ni ekscias, ke kelkaj el ili estos baldaŭ kaj legeblaj kaj aŭskulteblaj.

Estas preskaŭ la unua kaj duono, ni donas finon al nia eta enket-vizito. Laciĝo kaj malsato gvidas niajn paŝojn al la plej proksima tablo. Bonŝance la VM antaŭ unu monato inaŭguris rapidan restoracion en la butika parto. Ĉirkaŭ bona manĝo ni interŝanĝu niajn impresojn pri tiu unua vizito.

Antaŭ glaseto da burĝonja vino mi deklaras al mia nevo, ke nenio plu komunas kun la malnovaj bibliotekoj

kaj muzeoj: en ili ni penis, kurbitaj antaŭ tirkestoj, kie kuŝis centoj da slipoj pli malpli bone skribitaj per diversaj plumoj. Poste ni devis atendi ĉe ĝiceto ĝis la bibliotekisto trovis kaj alportis al ni la deziratan volumon. Mia nevo de antaŭe estas konvinkita pri la supereco de la VM super la PM, “la papera Muzeo”, kiel ĝin baptis mia nevo. Ĝi tiu estas bona, laŭ li, nur por la “dinsaŭra tempo”. Des pli ke en tiu epoko oni devis serĉi mem la lokon de interesiĝo en la libro mem ĵus pene havigita. Dume hodiaŭ kelkaj klavofrapoj surekranigas la libron. Kelkaj pliaj klavofrapoj liveras al ni la deziratan lokon. Mia nevo entuziasmiĝas pri la VM.

Mi atentigas lin, ke la VM ne estus eĉ pensebla manke de PM. Ĉio similas: la novaj generacioj pli alten grimpas, ĉar ili profitas la ŝultrojn de la pliaĝuloj. La gazeloj saltas sur la kolon de la dinosaŭroj. Sed oni komprenu, ke eĉ la plej junaj siavice dinosaŭriĝos antaŭ la imitontaj gazeloj.

André Albault

La 7-jara edukado.net

La 15an de decembro fariĝis nia paĝaro 7-jara. Dum tiu periodo en nia komunumo jam kolektiĝis 1910 personoj el 101 landoj, multaj el ili regule uzas niajn servojn kaj estas helpataj en sia instru-laboro.

Duoncento da kolegoj sendas siajn kontribuojn proponante ilin al komuna uzo. La usona poresperanta fondaĵo ESF kun dekmiloj da eŭroj financis la konstruon kaj funkciigas nian monds kalan klerigservon.

Ni invitas vin tralegi en la suba listo la resuman prezenton pri la plej gravaj servoj.

Helpiloj por instrui, lerni

- Pretaj lecionoj, kursmaterialoj kun multkriteria serĉo (jam 533 ekzercoj, elŝutitaj 98.900 foje) – Lerniloteko
- Detala prezento de eldonitaj, aĉeteblaj libroj, lernomaterialoj (371) – Katalogo
- Memtaksado, ekzamenoj laŭ novaj eŭropaj normoj legeblas ĉe la REFERENCKADRO-paĝo.
- MAZI – 36 detalaj lecionplanoj kun cento da ekzercoj - Metiejo
- Pasporto al la tuta mondo – ekde septembro lecionplanoj kaj novaj ekzercoj aperas ĉiusemajne – Metiejo
- Kunvojaĝu - plurdeko da ekzercoj, materialoj por la unuaj 12 ĉapitroj: Metiejo.
- Filmejo kun cento da filmmaterialoj el diversaj fontoj: FILMEJO.
- Instrumaterialoj, afiŝoj, fotoj, ludiloj, ideoj, trukoj – Metiejo
- Kursomaterialoj - el la DUA VIVO.
- Regule aperantaj kaj sendataj interesaj artikoloj kun aldonaj ekzercoj (je diversaj niveloj) – Monda Mozaiko
- Vi povas instrui kaj ekscii interesajn pri lingvoj en la sekcio TAGO de LINGVOJ.
- En nia nova IPERNITY-surfaco vi trovas filmitajn kaj analizitajn lecio-

nerojn : IPERNITY

Pluperfektigo, ekzamenoj:

- Aliaj retejoj por studi, kontaktigi, informiĝi - Retligiloj
- Pedagogiaj kaj lingvopolitikaj artikoloj, studoj, diplomlaboraĵoj, akademias cirkuleroj, elŝuteblaj lerniloj – Legejo
- Kalendaro de aranĝoj – Kursoj
- ILEI/UEA ekzamenoj, reguloj, sesioj, specimenoj – Internaciaj Ekzamenoj
- Dokumentoj, specimenoj pri naciaj ekzamsistemoj – Landaj Ekzamenoj

Kunlaborebloj, kontaktoj

- Viaj novaĵoj, alvokoj – Anoncoj
- Korespondpetoj (ĉ. 550 individuaj, 33 grupaj, kun rapida serĉilo) – Koresponda servo
- Listo de oficiale akceptitaj kursoj (videblas ankaŭ la uzataj materialoj) – E-lernejo
- Resuma paĝo kunigas la kurantajn LINGVOLERNIGAJN -projektojn.
- Informŝanĝoj, diskutejo – Forumo
- Trovi - proponi instruservojn (sinprezento de 26 instruhelpaj kolegoj) – Kursgvidantoj

Informiĝo, orientiĝo pri la paĝara laboro kaj la teamo:

- Atentindaj novaj artikoloj, libroj, eventoj (ĉiutage ŝanĝiĝas) - Aktualaĵoj
- Listo de ŝanĝoj, novaj artikoloj, ĉiutage aktualigita parto – Novaj eroj ĵus konstruita RSS-fluo (butono tuj ĉe la logotipo!) ebligas al vi aboni a_



je unu klako ekscii la plej laste enmetitajn erojn de la paĝaro. RSS-fluo.

- Klarigoj pri la uzo de la paĝaro - Helpopaĝo
- Printeblaj alilingvaj informoj pri edukado.net – Multlingvaj informoj
- Serĉo de temoj, artikoloj laŭvorte, laŭteme – serĉilo en la supra parto de la paĝaro

Skribu vian opinion pri

- Esperanto-libroj, lerniloj – Katalogo
- Eldonitaj lerniloj, materialoj – Lerniloteko, Metiejo
- Utilo, enhavo de la paĝaro – Gastlibro
- Eraroj, problemoj – Mi rimarkis, ke...

La servoj estas senpagaj, sed por la plenaj elŝutebloj kaj alŝuti materialojn kaj informojn de ĉiuj sekcioj NECESAS ESTI membro kaj ensaluti.

Pri novaj eroj, funkcioj kaj informoj eblas mendi mesaĝan averton.

La paĝaro estas ĉiutage kontinue flegata, aktualigata kaj al mesaĝoj la redaktoro tre rapide reagas.

Nia retejo devas esti urĝe transkons-

truita, kaj por tio, NI BEZONAS VIAN FINANCAN HELPON.

Edukado.net estas en danĝero.

Pro financaj kialoj fariĝas pli kaj pli malfacile pagi la kostojn de la funkciigo de edukado.net, kaj tute ne eblas modernigi aŭ plukonstrui la paĝaron. Transigi ĝin al alia, esperantista servilo pro kopi- kaj posedrajtaj kialoj ne eblas. Estas granda risko, ke edukado.net devos fermiĝi kaj perdiĝos ĉio, kion ĝi nun havas.

Tamen estas eblo savi ĝin...

...se ni sukcesos kolekti la necesan sumon por transkonstrui ĝin kaj forlasi la multekostan nederlandan servilon kaj entreprenon, kunlabore kun E@I metante ĝin en la manon de esperantistoj.

La transkonstruo estus bona okazo ankaŭ por modernigo kaj simpligo, rearanĝo de la nun jam ekstreme granda kaj malfacile travidebla materialo.

Por konstrui modernan kaj plene funkciantan paĝaron necesas 35 mil eŭroj.

Por konstrui ĝin tiel, ke ĝi povu ekfunkcii kun la bazaj servoj kaj je la nivelo kiu komfortas por la redaktado kaj baze praktikas por la uzantoj, tio kostos 25 mil eŭrojn.

Vidu la paĝon Subtenu nin kaj la apudan mesaĝon de la kasisto de Espéranto-France.

Dankon.

Katalin Kováts, redaktoro

Espéranto-France sin plene investas je subteno de la riĉ-enhava retejo Edukado.net, perante kolektadon de mono cele al rekonstruo de tiu retejo.

Se vi deziras monhelpi Edukado.net, bonvolu legi jenajn indikojn.

Informiĝu, pri la celoj kaj problemoj rilate al Edukado.net

www.edukado.net/pagina/Subtenu+nin%21/14097/

Vidu ankaŭ en LME, n° 557-8, julio 2006 kaj en tiu ĉi numero.

Porinforme, el la 1910 membroj de la paĝaro 293 estas francoj, la plej

multaj.

La rekordulo en la ekzerco-eĉsutoj (sume pli ol 110 mil en la lastaj 5 jaroj) estas franco, kiu pli ol 1500-fojojn eĉsutis ekzercojn.

Skribu al kasisto@esperanto-france.org kaj info@esperanto-france.org por averti la Kasiston kaj la oficiston de Espéranto-France, ke vi deziras mondonaci al Edukado.net pere de nia Landa asocio.

Faru:

a. Ĉekon al "Espéranto-France" kun indiko apud la ĉeko, ke temas pri donaco al Edukado.net, sendante la koverton al la adreso :

Espéranto-France
4 bis rue de la Cerisaie
75004 Paris

b. Aŭ bankan ĝiron al nia Poŝtbanka konto, kun sama indiko.

CCP 0085535D020 Paris
Vidu niajn kompletajn bankkonto-referencojn alkroĉe kaj ĉi-sube.
20041 00001 0085535D020 65
Centre financier de Paris
IBAN : FR31 2004 1000 0100 8553 5D02 065

BIC : PSSTFRPPPAR
Titulaire du compte :
ESPERANTO FRANCE

Espéranto-France tiam poste sendos la kolektitan sumon, vianome, al Edukado.net

per UEA-ĝiro, kolektinte rondan sumon (500, 1000 EUR au pli)

Aleks Kadar
Kasisto de Espéranto-France

The screenshot shows the Edukado.net website interface. At the top, there is a navigation bar with a search box and a language selector. The main content area features a large red banner with the text "Bonvenon ĉe la paĝaro de edukado.net!". Below this, there is a section titled "ANONCOJ" (Announcements) with several items, including "FRONTPAĜA ANONCO" and "PROPRIO BANKOKONTO DE LA FONDAĜO DE EDUKADO.NET". The left sidebar contains a list of categories such as "Aktualizaĵoj", "Por lerni", "Por kunlabori", and "Pri edukado.net".

(Suite de la p.7)



ron 50 ou plus.

- Antibes : /41 Pas d'espérantistes actifs connus. J'ai mis qqes affiches.
- Cannes : 2/27 +1350% Pas d'affichage de ma part. Existence d'un club, moribond ?
- Grasse : 0/12 Pas d'affichage. Pas d'espérantistes connus de moi.

• Mandelieu : 0/9 Pas d'affichage. Pas d'espérantistes connus de moi.

• Mouans-Sartoux : /2 Pas d'affichage. Pas d'espérantistes connus de moi. Traditionnellement ville écologiste - liste EE en tête avec 38% - mais dans un milieu plutôt supposé favorable nous faisons 0,06%. Il serait intéressant de voir le résultat avec affichage.

• Guillaumes : 5/5 Mon fief, meilleur score du 06 en % avec 1.70% mais stagnation par rapport à 2004.

Une forte progression globale par rapport à 2004. Il est évidemment plus facile de progresser lorsque l'on part de très bas, mais les voix sont des voix et il faut aller les chercher où que ce soit.

Il est difficile d'apprécier l'influence respective de l'affichage et des bulletins de votes en mairie.

À ce sujet il serait intéressant de comparer les résultats 2004/2009 en Corse où la seule différence en propagande provient des bulletins. Toutefois à Cannes, Grasse, Mandelieu et nombre de petites villes et villages où EDE fait de 1 à 5 voix et où il n'y a pas eu d'affichage, la progression est notable et essentiellement due aux bulletins si l'on fait abstraction de la propagande nationale qui était à peu près équivalente à celle de 2004. La présence, même ancienne d'un club ou d'un actif, laisse des semences prêtes à germer pendant longtemps, à condition que l'on aille solliciter le votant – affiches, bulletins, tracts... - ce qui témoigne d'un capital sympathie chez beaucoup de ceux qui ont touché de loin ou de près à l'Eo. Le résultat des Bouches du Rhône où Renée Triolle et ses collaborateurs sont

présents dans de nombreuses activités associatives locales confirme cela.

J'étais aussi convaincu dès le départ que nombre de farouches opposants espérantistes à EDE, une fois dans l'isoloir, voteraient « utile » pour l'espéranto.

POUR S'EXPRIMER ENTRE EUROPÉENS, L'ESPÉRANTO EST PLUS FACILE, MOINS CHER, ET IL RESPECTE MIEUX NOS LANGUES

NON À LA SÉLECTION PAR L'ANGLAIS !

POUR L'EUROPE, CHOISISSONS

UNE LANGUE INTERNATIONALE ÉQUITABLE

LE 7 JUIN, CHANGEONS L'EUROPE AVEC

EUROPE DÉMOCRATIE ESPÉRANTO
www.europe2009.fr



J'ai également noté une bonne efficacité de la diffusion sur ma liste d'adresse@ d'une profession de foi personnalisée. À titre d'anecdote, une relation professionnelle que je n'avais plus vue depuis une trentaine d'années si ce n'est lors d'une manifestation à Paris l'année dernière m'a répondu qu'elle et sa fille avaient voté EDE. Un collègue de La Réunion que j'avais hébergé il y a quelques années et qui était toujours dans ma liste internet m'a répondu en me remerciant de lui avoir donné une raison de voter...

Avec un clic de souris, sans aucune dépense, on peut avoir des résultats surprenants. Il faut stocker des adresses électroniques plusieurs années à l'avance et il ne fait aucun doute qu'au nom d'une vieille - ou récente - amitié, on

peut gonfler nos rangs avec des votes d'indécis ou d'abstentionnistes. Plusieurs personnes m'ont dit : « ça tombe bien, je ne savais pas pour qui voter, je vais voter pour toi. » Si nous sommes assez nombreux à en faire autant, ce sont quelques milliers de voix en plus à l'arrivée. Les analyses électorales sont toujours très complexes à interpréter et honni soit celui qui veut en tirer des conclusions « péremptoires ».

À des fins d'objectivité par rapport aux discussions en relation à ce thème, il serait nécessaire de disposer d'une bonne analyse des résultats en IDF avec comparaison des moyens de propagande mis en œuvre en 2004 et 2009 et pouvoir cerner les causes de la perte de voix dans cette circonscription. Il faut confronter la théorie aux faits.

Pour l'avenir, ce dont nous avons besoin, c'est d'un réseau de militants et de clubs locaux - viviers de futurs électeurs et afficheurs - et pour cela nous devons marcher main ds la main avec les associations nationales. J'ai prêché depuis plusieurs années chez EO-France pour la création d'un réseau de correspondants départementaux, sans succès, ne

disposant pas moi-même du temps nécessaire pour le mettre en place et le faire fonctionner. Peut-être faudra-t-il que nous le fassions au sein de EDE et je suis prêt à collaborer.

François Lo Jacomo : « Il y a certainement bon nombre d'espérantistes qui n'ont pas voté pour EDE. De plus, quelqu'un que je connais m'a dit qu'après m'avoir vu dans le spot télé, elle était allée sur le site, avait trouvé cela très intéressant... mais qu'elle a quand même voté pour une autre liste. Le résultat de cette campagne ne se limite pas aux 29 000 électeurs qui ont voté pour nous. »

Esperanto estas, l'outil qui nous manquait

Le DVD « Esperanto estas » a été lancé officiellement le 29 novembre 2009 lors de la journée « Portes ouvertes » au siège de l' UEA.

Depuis des décennies, les organisations cherchent le graal en matière de conduite du changement pour atteindre leurs buts, et le mouvement esperantophone ne fait pas exception. Comment conduire le changement lorsque le but est en soi un changement, un nouvel espoir de communication internationale équitable et pacifiée ? Nous devons revoir nos méthodes en permanence, nous adapter au monde qui évolue, souvent bien peu dans le sens que nous désirons. Toutefois, les outils techniques se démocratisent, et parmi eux, ceux qui facilitent la réalisation de DVD, le faible coût de reproduction et la diffusion d'un bien matériel dans le monde « réel ». La boîte et sa couverture sont la première chose que l'on perçoit. Après le DVD intitulé « Esperanto électronique », dont je vous laisse juger l'effet désastreux pour l'imaginaire concernant notre langue de Martiens, qui traîne son artificialité comme un péché originel, voici un outil bien plus percutant : « Esperanto estas ». Le titre d'abord : « Esperanto estas ». Simple, clair, limpide, vous allez découvrir ce qu'est l'esperanto. On n'insistera jamais assez sur les fondamentaux. Lorsque vous faites de la publicité pour l'esperanto, commencer par expliquer en quelques mots ce qu'est l'esperanto !

Un des classiques de la conduite du changement, est la capacité à donner forme à l'état futur. Nous-mêmes n'en avons pas besoin car nous vivons déjà l'esperanto, nous savourons la saveur des oj, des aj et des kaj, nous sentons le frisson qui parcourt une assemblée

multinationale libérée de ses entraves. Mais les autres ? Nos interlocuteurs ? Comment modifier leurs schémas de pensée routiniers, comment donner forme à ce futur que nous leur promettons ?

Montrer l'esperanto dans la vie réelle

Il n'existe qu'un seul moyen, en leur faisant vivre ce monde futur, par procuration et par l'image. « Esperanto estas » est un DVD constitué de séquences tournée en Esperantie. Non pas dans des salles de cours avec des gens qui apprennent l'esperanto, mais partout ailleurs avec des gens qui ne l'apprennent plus, mais qui le vivent.

Il est découpé



en 6

séquences.

Chapitre 01 – L'esperanto est une langue qui convient pour tout. Ce chapitre muet de 1'44 montre de nombreuses situations d'utilisation de la langue.

Chapitre 02 – L'esperanto est une langue aux multiples facettes. Ce chapitre de 8' introduit le but de l'esperanto, et présente ses caractéristiques :

- combinatoire, facile
- neutre
- ambassadeur de toutes les cultures
- équitable

On mentionne les avantages par rapport à l'anglais utilisé dans un contexte international en présence de locuteurs natifs. On donne la parole à quelques témoins, avec sous-titres. L'origine et

l'histoire sont rapidement esquissées, avant de laisser la place au Pasporta Servo, à l'aspect propédeutique, et à l'usage d'internet.

Si vous ne pouvez montrer qu'une séquence à des gens pressés, vous tenez un bon produit.

Chapitre 03 – L'esperanto est une langue utilisée de diverses manières. Cette séquence de 6'23 donne la parole à de nombreux témoins, et développe

plus l'aspect fraternel et la recherche de la paix. Elle est plus centrée sur l'aspect individuel, au niveau des locuteurs et leurs engagements, alors que la seconde traitait plus de l'aspect systémique.

Chapitre 04 – L'esperanto est une langue qu'il vaut la peine d'apprendre. Des témoins expliquent comment ils ont rencontré l'esperanto et commencé à l'apprendre. Il est intéressant d'écouter un Japonais mettre tous les verbes à la fin de ses phrases, comme

- dans sa langue. La grammaire est ensuite présentée en voix off à l'aide d'illustrations. Le tout en 13'22.

Chapitre 05 – L'espéranto est la langue d'un mouvement multicolore. L'idée interne est présentée comme moteur de l'engagement des espérantophones, avant de passer aux symboles et aux associations. 4'13.

Chapitre 06 – L'espéranto est la langue de l'avenir. Ce chapitre dure 9'30. A partir d'une description historique, on aborde de nombreux exemples d'innovations (chiffres arabes, avions) qui ont mis plusieurs siècles à s'imposer. L'égalité et le respect mutuel sont mis en perspective de l'avenir, qui peut dire à quoi ressemblera le futur de l'humanité ? Les remerciements défilent sur la musique de « juna idealisto » de Dolchamar avant de céder la place à quelques séquences de type « bêtisier » et des images. Cela donne une touche « humaine », citoyenne, beaucoup plus vivante que toute communication officielle d'un état.

Chaque chapitre est découpé en sous-parties, pour accéder très rapidement aux images recherchées si vous le montrez à l'aide d'un ordinateur portable. Outre son utilisation sur les stands, forums et présentations publiques, ce DVD constituera un bon entraînement pour les débutants. Les locuteurs s'expriment clairement et distinctement, avec tous les accents dont on peut rêver (nord-américain, sud-américain, asiatique, européen, africain). Vous pourrez réactiver vos connaissances dans les autres langues de doublage, de très bonne qualité. Un produit à découvrir et faire découvrir ; pour cela Espéranto-France en a acheté 150 pour le donner à chaque club.

Cyrille Hurstel

Pri la delegitoj de UEA

Kiel ĉefdelegito mi faras enketon ĉiun duan jaron.

Laŭ la jarlibro 2008, Francio provizas 114 delegitojn (86 Delegitoj, 6 Vic-Delegitoj, 71 Fak-Delegitoj kaj unu sola JunularDelegito !). La plimulto havas retadreson, 24 estis kontaktitaj per poŝto. Respondis 37 rete kaj 14 poŝte.

El la 51 respondintoj, 18 neniam estis kontaktitaj, 28 ricevis petojn pri turismo, vojaĝo aŭ gastigado, 7 pri komerco kaj industrio, 0 pri instruado, 1 pri scienco, 1 pri homaj rajtoj, 3 pri movado kaj 1 por retrovo de amiko, iama esperantisto.

Sekvis demandoj pri la prioritatoj de UEA.

Malofte okazas nura prelego pri la lingvo (6), plej ofte kunlige kun Eŭropa Unio, homaj rajtoj, paco, patrina lingvo, lingvo-festivalo, bildstrioj, ekologio, alternativa salono.

Faris ekspoziciojn (plej ofte kadre de la loka grupo) 19, el kio rezultis trideko da ekspozicioj en bibliotekoj, asocioj, lernejoj.


Same deĵoris ĉe budo 22, kun rekordo ĉe 8 budoj, kadre de forumo de asocioj, surstrataj lokaj eventoj, festoj de politikaj partioj aŭ alternativaj movadoj.

Pri agado en la loka grupo, nur 4 respondas, ke ili estas simplaj membroj, la ceteraj gvidas kursojn, estas estraranoj, ktp.

Delegitoj ĝenerale provas varbi membrojn por UEA, sed tre malfacilas.

Plej ofte, la respondinto ne plu povas distingi, ĉu li agis kiel delegito de UEA aŭ kiel bone laboranta esperantisto. Multaj demandoj venas per la reto kaj ne eblas kontroli, ĉu la petanto estas membro de UEA, do rajtas je la servo, aŭ simpla homo, kiu petas informon de bonvo-
lema esperantisto.

La ĉefdelegito por Francio,
Renée Triolle



Gvidas kurson 22 (kelkaj gvidas ĉe 5 kursojn semajne, 3 zorgas pri staĝoj, 2 instruas al lernejoj).

Prelegis 32 delegitoj. Ne mirinde rekordas profesiulo Bruno Robineau kun centoj da prelegoj.

Renkontiĝo en Agay

Témoignage d'une première fois

Pendant la semaine du 28 février au 7 mars 2009 a eu lieu un stage d'espéranto à Agay (près de Saint-Raphaël) dans le sud de la France. A chaque stage son ambiance donnée par les organisateurs, les «geinstruistoj», les participants mais aussi le lieu, l'environnement ...; c'est cette atmosphère que je vais tâcher de vous décrire. Tout d'abord le lieu : un charmant

hôtel des années 30 proche de la mer Méditerranée avec son petit parc, son petit jardin botanique, son petit bar, son salon de détente ... et surtout son équipe «d'enfer» : le directeur, l'animatrice, serveurs et serveuses du restaurant et du bar : disponibles, souriants, dynamiques, compétents, professionnels. Ses vacanciers non espérantistes, avec qui nous partageons les activités proposées par l'hôtel, nous permet-

tent d'échanger sur l'espéranto et ainsi nous évitent de rester en « vase clos »

Nos trois «instruistoj» étrangers : Karlo l'Italien, Miguel l'Espagnol et Stefan le Néozélandais nous permettent de nous confronter à différents accents. Les participants

(cubain, hongrois, belge flamand, espagnol, français ..) dont 3 couples mixtes (unis par l'espéranto !) sont participatifs et très actifs.

Enfin tout ce beau monde me permet de faire de «belles rencontres» et de faire connaissance avec des personnages «hauts en couleur».

Les cours sont agrémentés d'excursions proposées par l'hôtel ainsi que par nos organisatrices et de soirées aussi diverses que variées : musique, chant, danse (salsa !), «lumbildoj» sur le Guatemala, Madagascar, le Bénin..., sketch. Que les journées sont courtes !

Le beau temps n'a pas été des nôtres mais le soleil était dans nos coeurs et nos yeux.

Tout cela a contribué à participer à la magie de la première fois, ma première participation au stage d'Agay.

Tout simplement, merci Monique et Christine

A très bientôt donc.

Michèle Reverdy



Cerisaie

Pli bela sidejo

En 2007, pluraj deĵorantoj revis pri renovigo de la akcepta ĉambro de nia sidejo sed trovis nek teamon nek taŭgan daton.

Feliĉe, fine de februaro 2009, 5 franciliaj aktivuloj plibonigis tiun ĉambron dum tuta semajnfino.

Julia Hédoux, Emmanuel Debanne, Cyrille Poullet, Maxime Valy kaj mi purigis, protektis, farbis kaj refarbis murojn, ŝrankojn kaj bretarojn.

Ni respektis la antaŭplanitan buĝeton (+/- 300 €) por materialo (kiun ni uzos ankaŭ por aliaj ĉambroj) kaj 2 manĝoj.

Ni uzis blankan ekologian farbon.

Amikino de Emmanuel helpis nin glui plastan plankon. Ni finis la laboron dimanĉe je la 9a vespere !

Estis pli da laboro ol planite sed la rezulto estas videbla.

Mankas ankoraŭ kelkaj ŝanĝoj por detale fini la laboron. Ni lasis la kutimajn deĵorantojn ordigi meblojn por havi veran akceptan lokon.

Venonta etapo konsistas en refarbo de la klas-ĉambro kaj kuirejo.



Armelle



Piolat

El la decidoj de la komitato

Planoj de UFE

Instruado :

- Reeldonado de la Metodo 11 (farite intertempe)
- Organizado de regionaj staĝoj
- Pripensado pri nova moderna lernolibro

Informado :

- Aperigo de nova retejo de la asocio
- Pripensado pri la revuo LME

Librotenado :

- Plibonigo de la librotenado

- Normaligo de la rilatoj kun abonoj perataj de la asocio
- ŝanĝo de banko al solidareca banko

Pri la asocio ĝenerale :

- Polurado de la regularo

Agadoj interne de Esperantio

- Solidareco kun Afriko
Per mono kolektita ĉe membroj kaj francaj esperantistoj, la asocio, tra JM Cash, sendas librojn kaj mate-



rialojn al Afriko.

- Subteno al la asocio Interkant' Mondonaco je 200 EUR por helpi kovri la vojaĝkostojn de kantontoj partoprenontaj la unuan koncerton de "Kanto ĝenerala" en Bouresse la 12an de julio.
- Morala kaj organiza subteno al la projekto MIREGE Muzikaj, Internaciaj, Renkontoj Esperantistaj por Gejunuloj Eŭropaj gvidata de Franjo Lévêque. Tiu renkontiĝo okazas enkadre de porjunulaj programoj celante eŭropecan edukiĝon kaj estas subvenciata i.a. de eŭropaj instancoj (AFPEJA-Jeunesse et sports). ĝi okazis en la Muzika Centro de Baugé fine de oktobro, kaj ĝi kunigos 34 junulojn inter 13 kaj 17 jarojn, (kaj ties akompanantojn) el 7 landoj : Bulgario, ĉio, Francio, Italio, Rumanio, Slovenio, Ukrainio. Preparkunveno okazis en fino de aŭgusto.
- Subteno al Edukado.net
Per kolektado de mondonacoj de membroj kaj aliaj francaj esperantistoj
Per donaco de la asocio mem (500 EUR)

Elektita en Troyes

Nova estraro

- Prezidanto, responsulo pri regionaj federacioj : Xavier Dewidhem
- Kasisto : Aleks Kadar
- Ĝenerala Sekretario : elektota septembre
- Vicprezidanto pri eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado : Cyrille Hurstel
- Vicprezidanto pri kulturo, eldonado, kongresoj : Axel Rousseau
- Estrarano : Armelle Piolat

Septembre la komitato revoĉdonos, kaj intertempe oni serĉas ĝeneralan sekretarion.

Instruado

Novtipaj ekzamenoj

Nova lingvoekzamen-sistemo en Esperanto estis ellaborita de UEA kaj ITK (ŝtata lingvoekzamen-centro en Hungario). ĝi estas konforma al la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) kaj estas trapasebla en 3 niveloj : B1, B2 kaj C1. Pri tiu nova unulingva versio vi povas legi priskribon jam ankaŭ sur la hejmpaĝo de ITK, <http://itk.hu> alklakante la verdan steleton (baldaŭ kun pliaj detaloj).

Ekde januaro 2009 jam okazis 6 sesioj : Düsseldorf (Germanio), St.Andreasberg (Germanio), Rotterdam (Nederlando), Herzberg am Harz (Germanio).

Novaj sesioj ankaŭ okazis dum IJK kaj UK.

Datoj, informoj ankaŭ pri pli postaj sesioj, aliĝilo, ktp: <http://edukado.net/pagina/Sesioj+-+Aliĝo/22425>

Eksteraj agadoj

- Proĵet Esperanto
Lanĉita sendepende de Espéranto-France, kiu pripensas ĉu mondoni 1000 EUR cele aperi kiel partnero de la Projekto, kies patronoj estas famaj : Yann Arthus-Bertrand, Jean-Luc Van den Heede...(nun en diskuto)
- Kontaktado al elektitaj eŭropaj parlamentanoj...

Silvestra renkontiĝo

Impresoj pri la 25a internacia festivalo

La 25a internacia Festivalo okazis de la 27a de decembro 2008 ĝis la 3a de januaro 2009 en Düsseldorf (Germanio), organizita de Hans Dieter Platz, pli konata per la nomo HoDoPo. Estis 170 partoprenantoj el 22 landoj. Estis mia dua IF, ar mi jam partoprenis en I.F. antaŭ pli ol 20 jaroj.

La interkonan vesperon gvidis Mikaelo Bronstejn el Rusio ; poste, en ĉiu normala tago estis 4 aranĝoj (prelegoj, promenoj, ludoj) matene ; 4 post la tagmanĝo kaj 4 inter la kafaŭzo kaj la vespermanĝo. Necesas do elekti, kaj mi raportas pri tio, en kio mi ĉeestis.

La ĉijara temo estis: literaturo. Okazis podia debato kun Anna Löwenstein, Tacuo Hugimoto, Armela kaj Jak Le Puil kaj Paul Peeraerts pri la temo : Esperanto-literaturo : de kie kien ? ĝin gvidis Mikaelo Bronstejn surbaze de demandaro,

kiun li estis antaŭe disdoninta al la ĉeestantoj. Mi alvenis kun malfruo, reveninte el promenado. Dum mi ĉeestis, oni parolis pri tradukado, merkato, recenzoj. Mi trovis ke oni traktas tro da sinsekvaj punktoj, kaj ne sufiĉe profundiĝas en ĉiuj.

Mikaelo Bronstejn gvidis ankaŭ kvizon. La plej malfacila demando estis kiuj verkis ĉ Du el Ĝ ? Mi estis inter la 9 kiuj respondis : William Auld kaj Marjorie Boulton. Ne! 2 personoj trovis la ĝustan respondon : Marjorie Boulton kaj Pol Thorsen. Kaj mi havas la verkon en mia salono !

Dum sia aŭtora horo, Mikaelo Bronstejn prezentis sian aktivadon dum 2008: li tradukis, eldonis alies verkojn, verkis teatraĵon, ktp. Li ankaŭ kantis kantojn, kiuj iam aperos en nova KD. Anna Löwenstein prezentis sian novan romanon : ĉ Morto de artisto Ĝ. Kiel la ĉ ŝtona urbo Ĝ, temas pri his-

toria romano, kiun ŝi mem elangligis. Tiu dua romano rakontas la vivon de imperiestro Nerono. En la lundo, mi partoprenis en promenado al la juda tombejo. Ni omaĝis al la juda poetino Rose Ausländer.

Sed ne ĉiuj prelegoj rekte rilatis al la temo. Josi el Israelo, prelegis dufoje pri la juda humuro, kiu, laŭ li, estas propraĵo de orienta Eŭropo. Pli ol liaj teoriaj konsideroj plaĉis liaj ŝerĉoj. Plurajn mi konis sen scii ke ili estas judaj. u Judoj kopiis aliajn popolojn, aux inverse ?



Rusino montris bildojn pri vojaĝo al Nepalo ; franco raportis pri Rusio, kun komentoj de Mikaelo Bronstejn, kaj la argentina kantisto prezentis sian landon. Vespere estis unu programo por distri ĉiujn partoprenantojn : estis koncertoj de Jak le Puil kaj de argentina kantisto, kaj armenia

vespero. Unu el la vesperoj estis dediĉita al la jubileo, ĉar temis pri la 25a festivalo. La jubilean programon ekis per magiaĵo de Trixini. Komence I.F. celis esti arango por mezaĝuloj, kiuj ne plu partoprenas en junularaj aranĝoj, sed ankoraŭ ne estas maljunaj. Ili laboris dum la jaro kaj alvenis jarfine kun siaj infanoj. Sed montriĝas ke de iu jaro al la alia, ĉiam revenas la samaj : malmultaj venis unuafoje. I.F. estas novjara aranĝo , ĉe kiu regule troviĝas bando de geamikoj, kiuj kompreneble ĉiufoje aĝas unu plian jaron . Ne estis multaj infanoj, ĉar la gefiloj kreskis.

ĉiuvespere post la spektaklo (kaj ankaŭ dumtage) funkciis la ĉ knajpo Ĝ. ĉ Knajpo Ĝ estas germanismo por (bonetosa) trinkejo. Tie mi trinkis multajn tizanojn, ĉar, kiel multajn partoprenantojn, min kaptis malvarmo. Fine de la restado, amikino Grazyna,

el Litovio, proponis al mi ginsengan teon.

En la mardo

okazis la tuttaga ekskurso. Matene en Akeno, iama ĉefurbo de la imperio de Karolo la Granda ; ni vidis la katedralon kaj fabrikejon de spickukoj. Ni veturis al restoracio en Kelmis (Belgio). Dum la mango loka esperantisto klarigis la malsimplan historion de tiu loko, longe disputita de pluraj nacioj. En 1908 estis proklamita la Esperantoŝtato ĉ Amikejo Ĝ. Post la manĝo, ni veturis al loko, kie renkontiĝas la limoj de Belgio, Nederlando kaj Germanio. La ekskurso estis interesa. Sed mi revenis de ĝi malsana, tial mi ne plu eliris el la junulara gastejo antaŭ la tago de la hejmenveturado. Tial, mi nek vidis la historian parton de Düsseldorf, nek partoprenis en iu el la du novjaraj promenadoj.

Mi iris al la novjara bankedo, ĉar necesis ke mi min nutru. Je la 2a horo, oni bondeziris la novjaron al la Armenoj, ĉar estis jam la 24a horo en Armenio, kaj al la Japanoj, ĉar en ilia lando jam estis mateno. Je la 22a horo, mi jam kuŝis en mia lito kun miaj mikroboj.

ĉar la junulara gastejo ne disponigis al li sufiĉe da ĉambroj, HoDoPo ne povis doni al mi unulitan ĉambron. La samĉambranino estis ĉarma, sed ni ne dormis dum la sama tempo.

En la sabato la 3a de januaro sonoris mia vekilo je la 4a horo. Mi pretiĝis kaj trovis en la enirejo kelkajn esperantistojn babilantajn, rigardante la stelojn kaj adiaŭonte la forveturontojn. Mi vekis Brunon, la ŝoforon, kiu afable kondukis min al la stacidomo.

Tiom plaĉis al mi tiu dua partopreno en IF ke mi aliĝas al la amikaro kaj mi aliĝos al la 26a I.F., kiu okazos de la 27a de decembro 2009 ĝis la 3a de januaro 2010 en Nördlingen (Bavario), kun la temo : fabeloj.

Jacqueline Lepeix



Novajaĵoj el prelegturneoj

Ĝenerala raporto pri la turneo de Hori Jasuo kaj Arai Toŝinobu

Jasuo kaj Toŝinobu vizitis 13 klubojn de la 30a de marto ĝis la 29a de aprilo. Probable unu el la plej longaj turneoj jam organizitaj, gratulon al ili !

La vojaĝo ekis en Lille kaj finiĝis en Rennes post restado en Le Mans, Grésillon, Tours, Chateauroux,

Saint Brice, Périgueux, Kvinpetalo, Angoulême, V a n n e s , Landerneau, Dinan kaj Rennes. Dankindas ĉiuj kluboj, ĉar la programo estis tre bone respektata, sen survojaj problemoj. Laŭ kelk-

sekunda telefoninterŝanĝo kun Jasuo kiam li estis en Rennes, mi komprenis, ke niaj aventuristoj estis tre lacaj sed kontentaj pro tiu nova turneo en Francio. Kaj videble ankaŭ ĉiuj gastigintoj tre favore raportis.

Jasuo prelegis pri kaligrafio, go-ludo, paperfaldado, aziaj muzikiloj. Toŝinobu amuzis la spektantojn per siaj dancoj. Ah ! mi forgesas : kompreneble Hietori-terapijon prezentis fame konata preleganto Hori Jasuo...

En Lille, pro sukceso, ne ĉiuj povis kaligrafii, sed alie nur pozitivaj rimarkoj atingis min : “ĝoja etoso” en Le Mans, “interesaj temoj” en Angoulême. En Grésillon, ŝajnas, ke la primuzika prezento estis iom sub influo de la tre bongusta loka vino...

Mankas la raporto de Kvinpetalo, sed mi kalkulis, ke tre probable ĉeestis la prelegojn inter 250 kaj 300 esperantistoj (mirinde !) kaj pli ol 260 ne-esperantistoj. Laŭ tiuj ciferoj, oni povas

aserti, ke la turneo estis plensukcesa. En pluraj urboj (Lille, Chateauroux, Angoulême, Monfort apud Rennes) prelegoj tre sukcesis en klasoj da infanoj kaj adoleskantoj. Interesaj kontaktoj okazis dum tiuj kunvenoj, sed en Tours iu miris, ke la prelego okazas en alia lingvo ol la japana.

Ankaŭ pli ol kutime raportis gazetoj kun amuzaj nomoj : Nord Eclair, Ouest-France, La Nouvelle République, Populaire du Centre, Charente Libre, Sud Ouest, Petit Bleu. En Périgueux ankaŭ raportis Radio France Bleue Périgord .

Kiel lastjare dum la unua turneo, ĉiuj ŝatis la afablecon kaj humuron de niaj japanaj amikoj kiuj kapablas interesi tre diversajn publikojn pri temoj ĝenerale tre ekzotaj.

Dankon al ili, dankon al la akceptintaj kluboj.

Yves Nicolas.



Subteno al Afriko

Letero el Burundo

Karegaj Samideanoj,
Mi tutkore salutas vin,esperante ke vi bone fartas.

Mi nun volas vin informi ke ni, esperantistoj el Burundo,sukcese okazigis nian duan nacian kongreson de Esperanto en Rumonge. Esperantistoj el ok provincoj de la lando partoprenis la kongreson, eĉ kelkaj membroj de Esperanto-Civito kaj kvin skoltoj estis kun ANEBanoj. La rezulto estas kontentiga ĉar ni entuziasme partoprenis la kongreson.

Dum la kongreso oni laŭte legis bonegajn kaj valoregajn salut- kaj gratululetojn, kiujn eksterlandaj esperantistoj kaj E-asocioj sendis al la kongresanoj aŭ al la asocio. Ĉiuj kongresanoj multe dankis ĉiujn sendintojn de la leteroj, kaj ili multe gratulas la asocion ‘LEA’ (Liao-

ning-provinca Esperanto-Asocio,Ĉinio) pro la projekto de ĝemeliĝo inter la du urboj TIELING kaj RUMONGE. Esperanto bone evoluas en Burundo, kaj ni ne restas nur en disvastigo de Esperanto, sed samtempe ni turnas nian strategion al apliko de Esperanto. Mi permesu al mi nome de burundaj esperantistoj, elkore danki kaj gratuli s-rojn Wu Guojiang kaj Liu Zhengkun (el Ĉinio) pro siaj energiaj laboroj kaj senlaca penado por Esperanto-afero. Mi ankaŭ dankas niajn monhelpantojn kaj UEA, kiuj subvenciis nian asocion por okazigi la kongreson.

Karaj, nia kongreso finiĝis per la riĉaj enhavoj kaj mi informas ke ni bone kaj enordo trapasis ĉiujn punktojn de

la programo. (...) Karegaj Samideanoj, kiel mi jam diris, Esperanto evoluas en la lando, kaj necesas viaj helpoj por pliprogresigi kaj akceli la E-movadon. Por ke la gelemantoj riĉigu la scion lernante Esperanton, mi petas vortaretojn (Esperanto-Français) por disdoni al la gelemantoj. Mi ne volas vin ĝeni, sed se vi konsentas, vi bonvolas helpi nian movadon sendante eĉ unu vortaron. Por sekurigi la donacon,bonvolu rekomendigi la sendaĵon. Mi denove pardonpetas pro la ĝeno.

Mi antaŭdankas vin, atendante viajn bonajn reagojn !

Plej amike kaj samideane,

Hasano NTAHONSIGAYE
Asocio Nacia de Esperanto en Burundo
BP 170 Rumonge, BURUNDI

Evento de la jaro 2009 en Francio !


Post la kongreso en Troyes

La Interasocia Kongreso de Esperanto en Francio, kiu okazis en Troyes de la 7a de majo ĝis la 11a de majo 2009, kunvenigis 114 partoprenantojn kun inter ili 8 eksterlandanoj.

Ĝi estis organizata de membroj de Esperanto 10, kiuj kreis ĉiokaze Lokan Kongresan Komitato starigitan de Michèle Guingouin, Nicolle kaj Alain Zugetta, Claire kaj Laurent Philippe, Nicole Picard, Sylvie Marcoux, Jacqueline Lahaye kaj Daniel Pérard. Tiu komitato, kunlabore kun Claude Nourmont (priespondulino

de UFE pri la kongresaj organizadoj) klopodis, por ke tiu kongreso 2009 proponu riĉan kaj buntan programon kaj permesu renkontiĝojn kaj interkomunikadojn.

La trovo de la kongresejo (Centre Sportif de l'Aube) multe kontribuis al tiu celo kaj aliflanke la kongreso ne estus okazinta sen la subtenoj de la Departementa Konsilantaro de Aube, de la Urbo Troyes kaj de la Regiona



Konsilantaro de Ĉampanjo-Ardeno. La plej efika ago por danki ilin estus, ke vi revenu en nian belan regionon por ĝin viziti : kun plezuro Esperanto 10 atendas kaj akceptos vin !

La LKK-anoj

Pri la informado dum la kongreso

Unue, mi deziras gratulegi la grupon de Troyes, kiu tre bone rilatis kun ĵurnalistoj.

Laŭ informoj kiujn mi havas :

- aperis du pozitivaj artikoloj en L'Est éclair
- aperis unu en Libération Champagne
- okazis du elsendoj tra radio (Radio RCF kaj Champagne FM)
- okazis du elsendoj televidaj (loka kanalo canal 32 kaj France 3).

Pri tiu chi lasta mi volas paroli. Eblas multe lerni per ĝi.

Unue faktoj : trifoje la vorto "idéalistes", unufoje la vorto "utopiste" kaj "secte". Oni devas forigi de sia vortprovizo kelkajn vortojn, kiam oni traktas kun ĵurnalistoj. Neniām uzi la vortojn "artificielle", "neutre", "idéaliste", "utopiste", "secte", ĉar ni elektis la vortojn "équitable", "mouvement", "association" ktp.

Alia punkto nervozigas min, estas nia emo batali kontraŭ la kostoj de la tradukoj. Tio kostas po 2 eŭroj kape kaj jare en Eŭropo. La prezo de iu kafo por vivtenigi ĉiujn lingvojn. Neniu popolo konsentus pri tia perdo. Kiaj utopistoj ni do estas ?

Kaj ni nepre, rapide, komprenu, ke :

- la vera kosto estas la instruado sensukcesa de la angla
- la vera graveco estas la neebleco pri publika areo inter la civitanoj
- la malaperigo de la ideoj de la aliaj popoloj dum la ver-

kado de la leĝoj

- interpretado kostas (jam dekfoje mi diris ke tradukado temas pri skribaj aferoj, kiam oni parolas, oni interpretas), kaj ĝuste pro tio ĝi malaperas kaj devigas ĉiujn paroli la anglan

- ĝuste interpretado el Esperanto al naciaj lingvoj multe helpus en la instancoj

- Esperanto estas tro juna lingvo nun por esti punta lingvo por interpretado

Mi nun ĉesu kritiki. Ne forgesu ke pli bonas iom da kritiko ol nenio. Mi konas esperantiston kiu venis pro akraj kritikoj. Lastan jaron, ni ne allogis televidojn. Gratulegon al Troyes !

Cyrille Hurstel

Kaj krome...

La esperantistoj de Esperanto 10 sukcesis organizi ekspozicion en la mediateko de Troyes dum la sabata posttagmezo. Deĵoris diverslandaj esperantistoj, kaj venis multaj interesiĝantoj.

La bona informa laboro efikis. Mi enketis en la stacidomo de Troyes ĉe mia forveturo, skribas Renée Triolle. Unu respondis, ke li scias kio estas Esperanto pro televidelsendo, unu pro gazetartikolo pri kongreso, unu dank'al kliento (la gazetvendistino en la stacidomo), unu taksiisto pro kolego.

Jen plia pruvo, ke informagado estas bonvena !



Evento de la jaro 2009 en Francio !

Unua interasocia kongreso de Esperanto-asocio mia

Tuj mi sentis min akceptita de la organizantoj. Malsame kiel en iu “grandioza kongreso“. Despli ke mi retrovis Jacqueline Delahaye kun kiu mi partoprenis en rondo de ICEM-Esperanto (asocio pri pedagogio Freinet). Dum la tuta kongreso, ili ĉiuj afable respondis al demandoj kaj provis solvi iujn ajn problemojn.

La kongresejo taŭgis por la kunvenoj, manĝadoj kaj ripozo, ĉar ni bonŝance surloke dormis. Tamen mi bedaŭras ke, krom bone organizitaj vizitadoj, ĉiuj aktivaj okazis en la kongresejo, ekster la urbo Troyes.

Pro tio, mi ŝategis nian promenadon tra la stratetoj de la malnovaj kvartaloj. Tiele, ni iomete, sen ŝildoj, montris ke Esperanto estas vivanta lingvo kaj komunikilo. La LKK sukcesis venigi ĵurnalistojn de la lokaj gazetoj kaj televido. Tiele, pluraj valoraj artikoloj estis publikigitaj kaj kelkaj minutoj de televidelsendo videblaj.

Mi miris kiel lerte kaj klare la vicurbestro parolis, eĉ varbis pri Esperanto dum la inaŭguro. Poste, tintigante vinglason, li klarigis ke jam de longa tempo, li bone rilatas kun la esperanta klubo de Troyes. Li jam spertis la efikan uzadon de la lingvo dum renkontoj organizitaj de la klubo kaj ŝatis la etoson.

Krom la interfederacia kunveno, en kiu mi ne partoprenis, mi ne flaris la spiriton de la diversaj regionaj federacioj kaj asocioj. Mi travivis tiun kongreson kiel jara renkontiĝo, de individuaj membroj de UFE. Ĉu nur al mi ĝi tiel ŝajnis ?

Bankedo ne tro plaĉas al mi, sed mi profitis la balon por danci, dancigi kaj esti dancigita. Dank'al la akordionisto, mi sukcesis lacigi miajn korpon kaj piedojn. Bedaŭrinde, post tiom da dancado, energio mankis al mi por partopreni en la ĉiunokta freneza homlupo-ludo...



Plezure, mi revidis la teatran trupon el Tuluzo (Samia kaj Kiki), kiu eĉ malgraŭ malfacilaĵoj, ridigis min per la du teatraĵoj verkitaj de Rikardo Cash. Ĉifoje, ĉar mi jam iomete spertis ilian prezenton dum la kongreso de SAT-Amikaro, mi sukcesis aŭdi kaj parte kompreni la tekstojn deklamitaj kaj kantitaj de niaj Pafklikaj samideanoj. Pro iliaj ironio, ritmo, rimoj kaj vogleco mi entuziasmiĝis.

Renkonti homojn, interŝanĝi informojn, aŭskulti prelegojn kaj debati

Sed kongresi signifas ankaŭ renkonti esperantistojn, interŝanĝi informojn, aŭskulti prelegojn kaj debati.

La lumbildan vizitadon de Darmstadt, unu el la 15 ĝemelurboj de Troyes, interese mi sekvis. Pri tio, mi tuj rakontos anekdoton. Kvar tagoj post tiu prezentado de Maria Merla pri novarto, mi vizitis la bretonan muzeon en Rennes, kie ekspozicion pri artka-

helado estas proponata. Temas pri bretona eksfirmao Odorico, laŭ la familia itala nomo de la kreintoj. Mi legis ke Isidore Odorico, kiam li estis juna partoprenis en la 1a mondmilito kaj estis enkarcerigita en Darmstadt ! Tie, li renkontis novartajn artistojn kaj uzis tiun arton en sia firmao kiam li post milito rehejmeniris. Pro tio, en Bretonio, nuntempe, oni vidas ornamitajn domfasadojn per tiuj kaheloj, laŭ la itala tekniko.

Ankaŭ la prelego de Cyrille Hurstel kaj François Bartsch pri Alico en mislando multe plaĉis al mi. Klare, ili prezentis argumentojn kaj faktojn pri la diversaj krizoj, kiujn ni trapasas kiel fino de iu mondo. Estus interese proponi en la revuo instigi kaj daŭrigi la debaton. Krom la financa, la energia kaj la klimata krizoj, ni verŝajne spertos socian krizon.

Mi adiaŭis la kongresanojn per kantado dank'al nia ĥorestrino, Franjo kaj pluraj kongresaj kantemulinoj kiuj kuraĝe riĉigis kaj helpis la korusanojn kaj muzikistojn de Kantilie.

Guy Martin

La tuttaga ekskurso estis riĉa je vidindaĵoj. Unue ni vizitis kristalfabrikon en Bayel kaj vidis kiel oni produktas kaj mane prilaboras kristalajn objektojn por luksaj magazenoj. Sekvis apetitveka tagmanĝo en ĉarma restoracio kaj vizito de la kastelo Cirey sur Blaise kie vivis dum kelkaj jaroj la franca poeto, filozofo kaj teatro-verkisto Voltaire. Ĉefe admirinda estis malgranda teatro instalita sub la tegmento de la kastelo. La ekskurso ni finis per vizito de ĉampankolo de la vinproduktisto Drappier kaj gustumis kelkajn specojn de ĉampano.

Liba Gabalba

Evento de la jaro 2009 en Francio !

Prelegoj en Troyes

La kongreson en Troyes regis tute speciala organizeco : ĉiuj antaŭviditaj programeroj okazis, kaj eĉ okazis laŭ la planita tempo! Tiel simple legante la programon, vi povus verki plenan raporton!

Aldone al la statutaj laborkunvenoj : AG de GEE, AG de FKEA, komitatataj kunsidoj de UFE, kaj ĝenerala membro-kunveno okazis i.a. forumo rilate la strategion de UFE, Konferenco de federacioj, cerbumkirlado gvidata de Michèle Abada-Simon, agrable kaj efike informi pri Esperanto, laborrondo pri Agenda 21, kunsido de EDE.

Okazis multaj prelegoj

Dum la inaŭguro Paul Peeraerts ĉefprelegis pri Monato, “30 jarojn ne pri sed per Esperanto“. La magazino Monato, kiu nun festas sian 30an datrevenon, ne havis monotonan historion. Ĝin prizorgis sinsekve 3 diversaj eldonistoj, ĝi travivis 3 krizojn kaj pere-minacojn, sed ĉiam fenikse reviviĝis kaj pluservas la idealon de sia fondinto Stefan Maul, t.e. informi pri la mondo per Esperanto.

G i n e t t e
M a r t i n
atentokapte
rakontis
la aventurojn
kiujn ŝi travivis
pro La rue
Zamenhof.



La eldono de la traduko estis vera epopeo !

Vojaĝon tra la literatura ĝangalo proponis Claude Nourmont. La librokatalogo ĉiam proponas grandan varion da varoj, romanoj, rakontoj, poeziaĵoj... Kion elekti el tiu abundo ? Ŝi prezentis etan panoramon pri la

originala literaturo, la nuntempaj aŭtoroj, kun aparta atento al la plej lastatempe eldonitaj verkoj (kaj plej ŝatataj libroj). Kiel baza referenclibro oni nun konsultu (en la angla) la “Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto“.

En posta kunsido sekvis debato pri Eldona agado en Esperantujo, kun la partopreno de Paul Peeraerts, kaj kie oni preparolis ekz. pri la perspektivoj por eldonado de libroj en Esperanto. Ĉu ankaŭ tio estas kriza ? Kion eldoni, ĉu fakan literaturon, popularscienc-aĵojn, manlibrojn, fikciaĵojn, krucvortnigmojn ? Kio vendiĝas ? Kiel stimuli la merkaton ? Kiel vigligi la vendadon ? Ĉu libroservoj taŭge funkcias ? Ĉu informado pri (novaj) eldonaĵoj estas sufiĉa ?

Philippe Chavignon parolis pri Indiĝenaj popoloj kaj Esperanto, solidaraj vojaĝoj en mezameriko. De pli ol dek jaroj jam strukturiĝis la agado por enkonduki esperanton kiel laborlingvon en indiĝenaj medioj. La nuna agado en mezameriko celas ekoturisman solidaran, kontribuon al memstarigo de indiĝena turismo kaj edukadon de junaj indiĝeninoj.

Pri la ILEI-Konferenco en Benino prelegis Monique Arnaud kaj Jean-Pierre Boulet.

Por la unua fojo tiu evento okazis en Afriko. Estis belaj bildoj pri la laboro de tieaj esperantistoj, pri la konferenco mem, pri agemaj afrikaj esperantistoj, pri la

libreto verkita dum tiu semajno. Kaj ankaŭ pri la ĉiutaga vivo : vizito al muzikilistoj, al sapofabrikistino, vodua festo... kaj pri ekskurso en la suda parto de Benino.

Detlef Haussner belege raportis pri 25 jaroj de ĝemelurbaj renkontiĝoj. Jam de ol 25 jaroj funkcias renkontiĝoj



Alice en mislando

inter la ĝemelurba triopo Alkmaar (Nederlando), Darmstadt (Germanio) kaj Troyes (Francio). Tio eblis danke al la oficialaj interurbaj kontaktoj.

Ĝuste el Darmstadt Maria Merla bilde prezentis Novarto(n) en Darmstadt, konata kiel “Stadt des Jugendstils“ (“art deco“ aŭ “art nouveau“). Oni vidis kelkajn belajn lokojn, kaj havis unuajn impresojn de urbo proksime de la JEFO-GEJA junulara renkontiĝo “Festo“. Kvankam post la militaj detruoj ne plu restis multo la urbo estas konsiderata kiel la germana centro de tiu stilo kaj vivmaniero de la komenco de la 20a jarcento.

Floreal kaj Liba Gabalda faris belegan aŭdvidan prezenton Venezuelo, lando de beleco, dum kiu oni povis admiri la belecon kaj la kontrastojn de tiu sudamerika lando. Ili rakontis pri siaj spertoj en Venezuelo, kie ili loĝis, laboris kaj ankaŭ feris. Ni promenis tra ĝangalo, plaĝoj, naturparkoj, pitoreskaj vilaĝoj, muzeoj, lokaj festoj...

Kaj ni ne forgesu la tre atentokaptan prelegon de François Bartsch kaj Cyrille Hurstel, “Alico en mislando“. Ĉu senfina kresko de la ekonomio entute eblas ? Kaj senfina kresko de la aĉetpovo ? Ĉu la promesoj de la politikistoj en nia mirlanda mondo pravas ? Post kredo pri eterna pliboniĝo, la loĝantaro frontas al subita turmenta estonteco. Kion kaŝas la financa krizo ? Ĉu nur mallonga periodo da malfacilaĵoj, kaj poste la komercu rekomenciĝos kiel kutime ?

François Barstch kaj Cyrille Hurstel prezentis al ni la kuntekston kaj tion, kio stariĝas malantaŭ la spegulo de la financa krizo. Ili montris, ke seriozigas la verŝajnecon de mondo pli misfunkcianta ol mirinda, t.e. la mislando. Mondo kie multaj aspektoj de nia ĉiutaga vivo iom post iom fuŝiĝas. Sekvis vigla debato.



Bunta kongreso !

Evento de la jaro 2009 en Francio !

La voĉoj de la arta programo

La Pafklik

Estis du esperantaj repantoj, kiuj, nin ĉeestantojn, hiphope ataketis per humuraj, ironiaj rimoj (kvankam ege moderaj laŭ la kutimuloj). La nekutimaj ritmaj sonkoloroj taŭzis miajn orelojn klerigitajn al klasika muziko !

Ĉu vere ekzistas pluraj muzikoj ?

Persone, estas favore kaj necese ke pluraj muzikesprimoj ekzistas kaj kunvivadas laŭ la plezuro de ĉiuj. Tiom da "Pafklik" havis, sur podio, por alparoli, skandi ke ne sufiĉis la daŭro de la koncerteto por kompreni ilin !

Kiam "Pafklik" konferencos por ke ni

ĉiuj povu pridiskuti kaj debati la riĉan enhavon de iliaj tekstoj ?

Ĝuu favoran venton "Pafklik", via aŭdaco rejunigis min !

La Teatro-Trupo de Tuluza

Du komedietojn de Rikardo Cash, surscenigitajn de Arno Lagrange, ni povis spekti kaj admiri la amatoran duopon Samia kaj Kristina.

• "Grandioza kongreso" estas parodio de la kongreskutimoj ; vere, estis detale teatrumitaj niaj organizkutimoj ! Ridoj, ridegoj rendezuis ĉe la festsalono de la kongresejo.

Troyes plaĉis ! Kelkaj impresoj de partoprenintoj

Elkoran dankon kaj gratulon pro via bonega kongreso en urbo Troyes. Ĉio estis perfekte organizita kaj glate disvolviĝis ! Vere ege plaĉis al mi ! Mi ankaŭ estis surprizita pri la beleco de la regiono kaj la vojaĝo estis pli ol agrabla, kun la buntaj kampoj, skribis Marcel Delforge el Karloreĝo, Belgio.

Mi revenis tre entuziasma pri la kongreso de Troyes, tuj postkongrese skribis Ginette Martin.

La organizantoj starigis kongreson tre ambicia kaj riĉ-enhava, ĝi praktike estis la kopio de U.K.

Mankis nek la movada foiro, kiu montris la agojn de la regionaj federacioj, nek la "portempa" koruso talente majstrata de Franjo, kiu kunigis dezirantojn dum 4 prov-sesioj kaj montris la rezulton ĉe la fino de la kongreso. Ne mankis la turismaj vizitoj tre abundaj kaj lerte komentitaj, ne mankis la distraj vesperoj. Teatraĵoj de la Tuluza Teatra Trupo, rep-prezento de La Pafklik, filmoj pri Venezuelo tre plaĉis al la publiko. Ne mankis la bankedo kaj la posta balo, dum kiu malmultaj restis sur seĝoj. Ne mankis

la ekzamenoj por akiri diplomojn, la asembleoj de asocioj, la literaturaj aŭ strategiaj diskutoj.

Ne mankis la kunveno de ILEI kaj GEE, rakontoj kaj filmoj pri Benino.

Ne mankis la libro-servo. Ne mankis la renkontoj pri EDE kaj eŭropaj balotoj, kaj la prezento pri Indiĝenaj Popoloj.

Ne mankis la vigleco de la gejunuloj, kiuj vespere malfrue kuniĝis por malstreciĝi en lupo-ludo.

(el mesaĝo de LKK) Esperanto 10 esperas ke via revena vojaĝo okazis sen problemoj.

Ni ankaŭ esperas ke via ĉeesto en la troja kongreso estis por vi fruktodona, ke vi konservos bonan memoron pri ĝi kaj ke vi revenos viziti nian belan regionon.

Mi tre dankas vin por la agrabla kaj fruktodona kongreso. Mi devas aldoni "por ankaŭ la post-kongreso" ĉar vi estas tre zorgemaj pri viaj kongresanoj, substrekis Maryvonne Houviez, kaj ankaŭ Francisko Simonnet. Dankon ! Mi havis la intencon skribi vin dankante por viaj klopodoj en la aranĝado de la finiĝanta kongreso kaj

por la amika afableco, kun kiu vi nin akceptis. Mi nun jam devas vin danki ankaŭ por via postkongresa mesaĝo ĉi tie parte citata, responde al kiu mi nun skribas.

Tiu mesaĝo kaj la TTT-paĝo en ĝi anoncanta estas, laŭ mia opinio, iniciatoj tre laudindaj, imitindaj fare de organizantoj de aliaj kongresoj.

Kaj Samia, el la Tuluza Teatro-Trupo konkludas "Oui j'ai un peu honte d'avoir présenté "la grandioza kongreso" à Troyes car l'équipe d'organisateur a été géniale ! Pas trop vieille ni trop jeune et surtout disponible! je tenais à féliciter toute l'équipe !"





tilie

• “Duonhora pluvego“, unuaktaĵo kun mistera alkemio de la renkonto de du antipodaj virinoj.

La ludo plaĉis al la publiko kaj rememorigis al ni ĉiuj, ke, ekde la kreo de esperanto, teatraĵoj ekzistis kiel bona vektoro por lerni la lingvon kaj klerigi la aŭskultantojn.

Kiel Claude Nourmont diris : “Kiam ni revidos vin sur scenejo ?“.

La kantkongresanoj kaj “Kantilie“

Dum kvar kongrestagoj estis proponitaj unu horo kaj duono da kantado al la kongresanoj. Malgraŭ interesaj vizitoj kaj kunsidoj samtempe proponitaj, ni sukcesis provludi kun 15/18 gekantemuloj kaj proponi koncerteton al la kongresanoj.

La gekantemuloj plurvoĉe interpretis ok kantojn (pluraj stiloj) kelkfoje akompanitaj per akordiono, gitaro, sintezilo.

Iom da streso kaj multe da volo estis la taŭgaj ingrediencoj por bele, bone, ĝoje, mirakle, amike koncerteti antaŭ publiko.

Muziko, kreado, kanto, teatraĵo estas artoj cele al reprezentado, ĉefe maniero por komuniki. Do mi konkludas ke, dum la kongreso de Troyes, valoris la diversaj voĉoj por esperante komuniki arton.

Franjo
gvidantistino de la kongresa koruso,
partopreninto en la kongreso de
Troyes



La Pafklik

- le concert de la Pafklik (bien meilleure que dans leurs 2 précédentes prestations que j’avais pu entendre ; la technique et la salle étaient bonnes)

- la visite de la cristallerie
Ce que je pourrais regretter...

J’ai l’impression que tout le monde ne se mélange pas assez. Même si nous sommes prêts à aborder tous les participants, beaucoup sont indisponibles du fait des préoccupations dues aux obligations : réunion, responsabilités... ou dues à des lieux de résidence dispersés, des lieux de repas dispersés dans les caravanes par exemple, des différences des jours d’arrivées-départs. Comment créer plus de cohésion entre les différentes régions, clubs, simples adhérents ?

La plej juna partopreninto !



Agrablaj surprizoj ĉe la alveno

Tre afable kaj zorgeme nin akceptis la lokaj organizantoj. Unua bona surprizo : ni ricevas belan teketon (kaj ne iun ajnan paperan dosierujon...). Dua bona surprizo : la teketo enhavas ne nur iujn turismajn paperojn, sed belan libregon pri la regiono. Aldonu al tio bongustajn “ĉampanjajn ŝtopilojn“ (temas pri lokaj bonbonoj), kaj vi certe komprenos, ke la komenco estis tre bona ! Des pli ke post instaligo, ni povis tuj refreŝigi ĉe la ekfunkciinta kongresa trinkejeto. (CNM)

Impressions de Jean-Louis Poulet : “Bien qu’assez préoccupé par la tenue du Libro-servo et la participation au chant choral avec Franjo, j’ai beaucoup apprécié ce congrès, qui m’a permis de repérer quelques nouvelles têtes sympathiques. Le climat était très détendu et tous les problèmes ont été résolus sans énervement grâce à l’efficacité de l’équipe locale qui avait vraiment bien tout préparé et était prête à tout faire pour nous satisfaire. Dans le programme j’ai particulièrement apprécié...

- le théâtre, les deux séances,
- le voyage au Venezuela,

Esperanto en malluksa Afriko

La kresko de esperantistoj en kelkaj tre malri_aj landoj montras ke Esperanto ne estas nur luksa_o praktikata de intelektuloj en ri_aj landoj. Statistikoj mankas, sed se dedukti el la nova_oj en 'ESPERANTO EN AFRIKO', bulteno de la Afrika Komisiono de UEA, la kursoj multobli_as dum la lastaj jaroj en Togoo, Benino, kaj Burundo, dum en aliaj landoj: Malagasujo, Angolo, Ni_erlandoj kaj Ebura Bordo (kelkaj anka_diras Kotdivuaro) la organiza_oj de esperantistoj estas bone establitaj kun kongresoj, okazas kursoj, ekzamenoj ktp.

Dum Afriko enhavas 54 suverenanajn _tatojn, en 23 el ili esperantistoj estas konataj internacie kaj esperantaj grupoj konatas en 17 landoj. Ok el tiuj dek-sep havas landajn asociojn ali_intajn al UEA. Unu fakto devus alarmeti nin: Tiuj ok landoj, malkrom Sud-Afriko, estas _iuj franclingvaj. La nuraj anglalingvaj landoj kie vivas esperantistoj estas Tanzanio kaj Ganao. Ne povas ne esti rilato kun tio, ke la angla estas sufi_e superregema a_/ kaj Esperanto forte apogi_as sur la franclingva vortotrezoro.

En pasinta januaro Svetlana Milanovi_ kaj mi mem donis kursojn por komencantoj kaj progresantoj en Burundo, _e la lago Tanganjiko, unu el la dek plej malri_aj landoj de la mondo. Ni suferis malluksecon, maleston de ta_gaj nutra_oj, noktanta bruado kaj malpurecon, sed ni hontas diri tion, _ar la periodo de suferado por ni estis nur unu monato, do pli bone plendu pro la da_raj suferadoj de la afrikanoj ol pro la propraj nekonvena_oj.

_ar la entuziasmo por niaj kursoj estis ege granda, ni enga_i_is ne nur bone instrui ilin, sed anka_

trovi manierojn por helpi organizi ilian asocion. Pro la malri_eco kotizado de membroj de kluboj estas nepraktikebla. Jam kurslibrojn la burundanoj ne povas a_eti kaj se iu havas kurslibreton, _i estas balda_ _ifonita pro eluzado tra multaj fingroj, pro manko de bona formetujo, ekzemple libro_ranketo.

Kion fari? Ni elpensis kaj decidis helpi starigi Esperanto-centron, kie la lokaj esperantistoj povos renkonti_i, kie gardatos Esperanto-libroj kaj kie, por havi enspezojn, estos komputiloj kun ret-aliro por la paganta publiko. La konstruado de la centro devos esti financata pere de monvarbado inter pli ri_aj esperantistoj en la mondo.

En la pasinta jaruono ni fondis fonda_on "Esperanto en evoluo" kun propra retejo, kiu celas ne nur helpi financi la Esperanto-centron en Burundo, sed " _iujn profitodonajn projektojn en malri_aj landoj, kiuj celas doni bezonatan financan bazon al la tiea Esperanto-movado, tiel tekstas la statuto.

Nia kampanjo komenci_os dum la Universala Kongreso, kun ankora_ nekonata sukceso, sed certe la burundaj esperantistoj bezonas anka_ vian financan helpon.

Se vi volas scii pli, klaku al <http://esp-evoluo.tk>, kie vi konati_os kun la internacia estraro, la urbo Rumonge, kie la Esperanto-centro estas planita kaj kun niaj amikoj tie. La kontonumero por donaci al la centro estas 1312.96.116 de ĉSt. Esperanto en evoluo favore al 378964 _e RABO-bank, Nederlando (la BIC estas PSTB NL21 a_uzu IBAN-numeron NL24PSTB0000378964). Anka_ _e UEA estas konto nia kun kodo ceer-u.

Johan Derks

El Orienta Kongo:

La biblioteko de nia grupo entute konsistis el diversaj libroj en diversaj lingvoj: franca 2/4, angla 1/4 kaj Espe-

ranta 1/4. Sendu kiun ajn libron, kiun vi trovos sed plej speciale esperantajn librojn.

Pri nacilingvaj libroj, ni preferas ricevi librojn en la franca pri geografio, psikologio, matematiko, religio...

Adreso: EMMANUEL MUCHUTI Rafiki
PO. BOX 1 BUNAGANA
UG- KISORO, Uganda
[Orientkonganoj havas adresojn en Uganda, _ar tie la po_to funkcias pli bone]

Monumento...

La franca esperantisto kaj entreprenisto Michel Basso volas konstrui en junio 2009 en Herzberg am Harz du belajn grandajn monumentojn ESPERO kaj ESPERANTO. Li bezonas por la betonkrustoj de la monumentoj ŝtonetojn el la tuta mondo por esprimi la mondsolidarecon al la oficiala Esperanto-urbo Herzberg am Harz.

La unuaj ŝtonetoj jam alvenis, ekz. vitra fragmento kaj ŝtonetoj de la fama Esperantoplatsen en Gotenburgo en Svedio.

La urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg Gerhard Walter kaj Peter Zilvar (estro de la centro) jam nun tre ĝojas pri la mondvastaj kontribuoj.

Bv. sendi vian ŝtoneton el via urbo resp. regiono tuj per poŝto al Herzberg - la Esperanto-urbo au bv. persone transdoni al Michel Basso dum la Germana kaj Europa Esperanto-Kongreso en Herzberg je fino de de majo 2009.

KUNE NI KONSTRUU la oficialan Esperanto-urbon!

<http://esperanto-urbo.de>
Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg
D-37412 Herzberg/Harz, la Esperanto-urbo

Comédie musicale à Vannes (56), en Bretagne

Le dimanche 1^{er} février, l'association Esperanto-Vannes a proposé une représentation d'une comédie musicale, « La salle d'attente » (« La atendejo » en esperanto), écrite par Jacqueline Ahier. La salle était comble et le spectacle a été très apprécié de tous. Le scénario de la pièce était très simple, mais laissait beaucoup de liberté au spectateur quant à l'interprétation du sens de la pièce.

Alternant jeu des acteurs, musique et chant, la pièce avait tout d'une recette de cocktail détonant : des patients attendent le docteur dans une salle d'attente, et chacun arrive l'un après l'autre : un musicien, une sportive, une femme enceinte sur le point d'accoucher, un couple...

Chaque personne rajoute ainsi sa touche de personnalité, et l'ambiance

de la salle d'attente passe de la bonne humeur à la dispute, en passant par la chanson et la solidarité, surtout lorsque vient le moment où la femme enceinte pense être prête à accoucher, et que le docteur n'est toujours pas arrivé...

Une pièce mêlant humour, suspense et quiproquos, où le public s'identifie facilement aux personnages. La pièce dégage des messages importants tels que l'amour, la tolérance, la solidarité entre les hommes... et surtout la patience !

Une belle leçon sur la vie, et un bon moment passé en théâtre, chanson et musique. C'est sûr, la prochaine fois que je devrai attendre des heures en salle d'attente, je ne le ferai plus avec la même perspective !

Estelle Loiseau

Mi devas diri, ke tiu projekto komenciĝis antaŭ pli ol unu jaro, per propono de Jacqueline kaj Michel. La plejmulto el ni ne tiam konsciis pri la graveco de la tasko : lerni 15 kantojn, sian propran tekston (kaj plie la ĝustan momenton por diri ĝin...), la movojn, la delokiĝojn, krei dekoron, serĉi kostumojn, provludi, zorgi pri



informado. Ludigi kune 14 amatorojn inter 18- kaj pli ol 80-jarajn, ne estis simpla afero. Sed ĉiu motiviĝis kaj alportis sian ŝtonon. Iom post iom, La atendejo ekformiĝis. Samtempe kun la progresoj, la plezuro pliiĝis kaj oni povas ja aserti, ke finfine ni multe ĝojis kunkune !

Tiuokaze, mi "aktoriĝis" unuafoje. Mi jam kantis antaŭe en ĥoroj kun Petro, mia edzo, sed por ni tiu provo estis tute malsama. La voĉlaboro ne sufiĉis, ni malkovris ankaŭ la korpo-laboron kaj la nepran atenton al la aliuloj, kio estas kondiĉo por la spektakloflueco. Tio multe interesis min ! La amika kaj solidara etoso en la grupo ankaŭ certe kontribuis al partoprenigo en la ĝenerala klopodo. Ŝajnis al ĉiuj, ke ili donis la maksimumon !

Elinjo el Esperanto-Vannes

Literatura konkurso Liro-2009

La Ondo de Esperanto denove invitas _iujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso Liro. Ĉi-jare la organizantoj proponas tri originalajn branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Recenzo de la romano *Serpentoj* en la puto de István Nemere (Kaliningrado, Sezonoj, 2009).

En la 1^a (prozo) kaj en la 2^a (poezio) branĉoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. En la 3^a branĉo (recenzo)

- nur per unu verko.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, abon. jaŝĉik 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1^a de decembro 2009.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com.

Legu pli pri Liro <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>

LA ATENDEJO

Muzika komedio esperante verkita de Jacqueline Ahier

Enscenigo : Jacqueline Ahier

Ĥorestro : Michel Krassik

Aktoroj kaj kantistoj : la ĥoranoj de Esperanto-Vannes

Dekoro : Odile et Roger Hédan

Rekte, kuraĝe, elegante!

Estante ekde jardekoj arda ŝatanto de biografiaj verkoj, mi konvinkigis ke,

a) ĉiu ajn biografia verko ne povas esti konsumita unuglute, ĉar estas fakte la homa vivo, kiun vi emas enkapigi kaj kompreni ;

b) ĉiu ajn biografia verko ne estu akceptata kiel veraĵo en la lasta instanco, t.e., se la persono interesas min, mi ne pigru eltrovi almenaŭ unu-du aliajn informfontojn pri la persono.

Do, kiam min atingis freŝeldonita de FEL libro “Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto”, tiu libro estis por mi ne la unua fonto de scio pri koncerna persono. Sed, traleginte la libron kun apliko de mia a-konvinko, t.e. dum kelkaj monatoj, farante paŭzojn inter la ĉapitroj, mi rajtas opinii ĝin esence fundamenta kaj faktoplana verko, utila por la esperantologio. Ankaŭ leginda de ĉiu, kiu ŝatas mergiĝi en la historion ne nur de nia movado, sed de tiu epoko kruela, mondrenversa, eventoriĉa, kia estis la unua duono de la XX-a jarcento.

Vivo brila kaj sindona

La vivo de Lidia Zamenhof, glora kaj kompatinda filino de la Majstro, la vivo, kiu daŭris nur tridek ok jarojn kaj estis feroce rompita kune kun ses milionoj de aliaj judaj vivoj, la vivo brila kaj sindona - sendube meritis detalan intervenon de sperta biografiisto. Estas grava bonŝanco, ke tiun intervenon efektivigis Wendy Heller, profesia lingvisto kaj renoma verkistino. Estas grava bonŝanco, ke la libro estis verkita en la angla kaj eldonita en Oxford. Ĉar, laŭmerite okupante bretlokon apud gravaj biografiaj esplorverkoj, la libro pri Lidia Zamenhof nepre altigos aŭtoritaton de Esperanto – kaj de la lingvo, kaj de la movado. Estas grava bonŝanco, ke, (ho ve, - nur post pli ol dudek jaroj !) per komuna laboro de la tradukinto

Bernhard Westerhoff kaj la aŭtorino mem, la biografio de Lidia, ensorbinta suplementan faktaron, intertempe akiritan, atingis esperantlingvan leganton.


De jaro al jaro la vivobildo de Lidia Zamenhof estas fidine disvolvita en 30 ĉapitroj kaj prologo kun epilogo. Tiun bildon abunde ilustras diraĵoj de la protagonistino mem kaj ne malpli abunde - diraĵoj de la ĉirkaŭintaj homoj pri ĝi. Ankaŭ sesdek bonkvalitaj fotoj, karikaturaj kaj dokumentkopioj. Antaŭparoloj – por la anglalingva kaj por la esperanta eldonoj, fontindikoj kaj indekso inde kompletigas la verkon. La aŭtorino povus komenci la rakonton pri Lidia ekde ŝia naskiĝo,

gaminte, eble, la komencon per kurta ekskurso en la vivon de la parenaro kaj per referencoj al kelkaj biografiaj verkoj pri la eminenta patro. Sed ŝi ne iris tiun vojon.

“Ĉar ne eblas kompreni (MB) Lidian, ne konante Ludovikon, ŝia historio vere komenciĝas per la lia.” - kun tiu opinio Wendy Heller enlibrigas tri unuajn ĉapitrojn sen Lidia, donante per ili bazajn konojn pri la vivo kaj vivkonceptoj de ŝia patro. Sinsekve la tri ĉapitroj havas nomojn: “La doktoro kaj la revo”, “Esperanto” kaj “La Interna Ideo”. Pozitivaj opinioj pri Ludoviko kaj pri Esperanto-movado nepre influas formiĝon de samopinio ĉe leganto ne esperantista. Normale Ludoviko ĉeestas ankaŭ en postaj tri ĉapitroj – jam kun la rolo de patro, edukanto kaj inspiranto. Tiun ĉi lastan rolon vere gravas kompreni por ne miri poste, ke la filino, en infanaĝo indiferenta por la inventaĵo de sia

patro, perdinta lin ĉe sia aĝo nur dekkvarjara, tamen akceptis lian vojon kaj restis fidela al lia ideo dum la tuta vivo.

“Rekte, kuraĝe, elegante!” Jen estis la ĉefa vivslogano de Lidia, iom ŝanĝinta la vortojn de Ludoviko, la slogano por ŝia konscia vivo, por la mondvojaĝo celanta propagandi kaj instrui Esperanton. La libro montras maturiĝon de Lidia, kiel ĉe-metoda instruistino kaj ŝian triumfan instruadon en eŭropaj landoj. En nia dudekunua jarcento, provizanta abundajn logaĵojn, ni pene povas imagi centpersonajn pagatajn kursojn de Esperanto. Sed Lidia rikoltis tiujn en multaj urboj kaj sukcese gvidis siajn milojn da gelemantojn en Esperantujon. Tiun gloran vivoparton la aŭtorino prezentas kun skrupula detaleco. Ankaŭ la sekvantan usonan periodon, ombrigitan per malsanoj, malestimo kaj eĉ klaĉado de kelkaj esperantlingvanoj - ho, tiutempa



ekstera trankvileco de Lidia estas enviinda kaj imitinda !

Ili sukcese enkapigadis al la amasoj ke estas la judoj, kiuj kulpas pri ĉio

Jen kaj jen intervenas en la ĉapitroj la bildoj de naskiĝanta kaj evoluanta nazia koŝmaro. Tiun akompanas nehoma malamo al unu gento, al judoj – ne nur en la nazia Germanio, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, ĉefe en Pollando, la patrujo de Esperanto kaj de Lidia. Wendy Heller donas al la leganto komprenon pri radikoj de tiu malamo : dum malbonaj vivkondiĉoj de la intermilita tempo la politikistoj devus inventi iun kulpulon por pravigi suferojn de siaj popoloj. Per speciale inventata, konstanta, senhonte kalumnia agitado, ili sukcese enkapigadis al la amasoj, ne ŝatantaj mediti kaj analizi, ke estas la judoj, kiuj kulpas pri ĉio. La situacio pli kaj pli ardiĝas en 1938. Tiam la germana registaro decidis deporti ĉiujn polajn judojn, loĝintajn dum multaj jaroj en Germanio, reen al Pollando, sed la patrolando ne volas akcepti ilin !

Tamen, mi pensis, kiel tio koncernu Lidia-n ? Ja tiutempe ŝi estis en Usono kaj havis plurajn invitojn por gvidi ĉe-kursojn. Kiel do okazis, ke tiu plezure akceptata, atendata kaj dezirata instruistino estis devigita reiri al Eŭropo, al Pollando, renkonten al sia morto ? La libro detale prezentas evoluon de la eventoj, do mi konkludas, ke parton de la kulpo pri ŝia pereco prenas multaj homoj. La usonaj burokrataj instancoj, postulintaj ŝian foriron – ĉu ili ne estis informitaj pri la situacio en Pollando ? Mi dubas. La kanadaj esperantistoj, rifuzintaj la inviton por Lidia – pro antaŭvidataj komplikaĵoj ĉe preparo de la dokumentoj. La religia gvidanto de Lidia – lin ŝi demandis ĉiam antaŭ fari vican paŝon en la vivo. Jes, li telegrafis, rekomen-

dinte reveni al Pollando, sed, loĝinta en Persujo, eble li ne havis ĝustajn informojn pri la minacoj por la judoj en Eŭropo. Ankaŭ mem Lidia, kies kristala pureco ne permesis mensogi, do ĉe enketo ŝi skribis honeste, ke estis ricevinta monon por sia kursgvidado, sekve malobeis la usonajn leĝojn...

“Se mi forlasis Amerikon, - skribis ŝi al franca korespondanto, - eble estas pro tio, ke Dio preferis, ke mi laboru en alia lando. Kaj en la elekto de Dio la decida konsidero estas ne mia kontenteco, ne mia plezuro, nek eĉ mia sekureco – sed la laboro, kiun mi povas kaj devas fari”.

Ŝiaj multnombraj geomikoj-samreligianoj, ame kaj helpeme akceptantaj ŝin en ĉiuj landoj

Ĝis nun mi neniel menciis la konatan

Muzikaj novaĵoj

Karaj ŝatantoj de Esperanto-muziko, post longega preparado finfine ni havas la plezuron anonci al vi, ke ni malfermas publike novan retejon (MP3-servo) komplementa al la jam konata www.vinilkosmo.com, kiu ebligas al vi lauxleĝe akiri Esperantajn muzikojn per elŝutado.

La retejo evoluos plu ankaux en la venontaj monatoj, ĉar momente nur la kategorioj “Popo - roko - hiphopo - elektronik” kaj “kanzono - tradicia” estas provizitaj per la eldonitaj albumoj de Vinilkosmo.

Sekve la ceteraj albumoj de la katalogo de Vinilkosmo estos iom post iom aldonitaj laux la interkonsentoj kun la artistoj.

Ni invitas vin viziti kaj malkovri tiun

fakton, ke Lidia estis adepto de la Bahaa religio. Ankaŭ tiu ŝia vivlinio ĉiupaŝe ĉeestas en la libro de Wendy Heller. La Gardanto, Shoĝi Efendi, kiun ŝi konsultas konstante. Ŝiaj multnombraj geomikoj-samreligianoj, ame kaj helpeme akceptantaj ŝin en ĉiuj landoj. Ŝiaj pensoj, venintaj en ŝiaj leteroj – pri Dio, pri la kredo, pri ligo inter la Bahaa religio kaj Esperanto. Al mi, ateisto pro analfabeteco, plaĉas, ke la aŭtorino neniom trudas al la legantoj la religiajn preferojn de Lidia, rakontante pri tiuj egale samkiel pri ĉiuj vivnuancoj, gravaj por la biografio.

Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin, Rusio)

Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto. Wendy Heller. Tradukis B. Westerhoff.

FEL. Antverpeno. 2007. 398 paĝoj. Prezo: 27.60 €



ĉi novan servon de Vinilkosmo, kaj antaŭ ĉio por bone kompreni kiel funkcias la MP3-servo bonvolu legi la “Helpkonsiloj”-n en la maldekstra menuo malsupre ĉe “Informoj”. Mi esperas ke tiu nova retejo plaĉos al vi, kaj ke vi venos ofte viziti ĝin kaj sekvi kiel ĝi evoluas ...

Notu bone la adreson :

www.vinilkosmo-mp3.com

Bonan viziton ! - Plej muzikajn salutojn

Flo !

Floreall Martorell

VINILKOSMO, “Esperanto-Muzik-prod.”

ret : vinilkosmo@esperanto.org

www.vinilkosmo-mp3.com

Interkant'

Dum la kongreso en Troyes la koruso "Kantilie" kantis en la fino de la kongreso. LME intervjuis Franjon Lévêque-Provost, ĝia korusestro.

LME : dum la kongreso en Troyes vi bele kantis kun via koruso "Kantilie". Sed mi aŭdis, ke ankaŭ en Troyes vi kreis novan grupon pri kantado. Pri kio temas ?

FL : Efektive dum la kongreso en Troyes naskiĝis "INTERKANT".

kaj spertis ke la esperantistoj ŝategas kantadi. Kantoj estas sinonimo de festo. Ili uzas saman lingvon, estas preskaŭ devo proponi saman repertuaron.

Krei komunan repertuaron por, laŭcirkonstanco, prezenti esperantajn kantojn, ekzemple kiel dum la kongreso de Troyes.

Krei, interpreti, komunan kantverkaĵon kiel komuna projekto, konkrete "Kanto ĝenerala" (verkita de Pablo Neruda kaj Mikis Theodorakis), kiun ni unufoje interpretis je la 12a de julio en Bouresse, okaze de

cirkonstancoj (kongresoj, specialaj manifestacioj) ?

FL : Mi intencas proponi du komunajn repertuarojn :

- la unua repertuaro povus esti regiona repertuaro, por prezenti ĝin ekster la esperanta medio dum kuniĝo de korusoj.

- la dua estus ĉefe artkreado. Mi ŝatus prepari kompletan prezentadon kie teatraĵo, muziko, kantado, danco iĝos karno, koro de la spektaklo. Sufiĉos kunigi la diversajn esperantajn



LME : ĉu temas pri formala asocio, aŭ nur grupiĝo de asocioj?

FL : Interkant' estas sendependa esperantista asocio. Ni deponis statutojn kaj elektis estraron por la administra funkciado. Interkant' kunigas plurajn kantgrupojn el diversaj regionoj.

LME : En kiuj regionoj vi rilatas kun korusoj ?

FL : Bretonio kun Meven, de 10 jaroj tiu kantgrupo estas unu el la diversaj aktivaĵoj de la FEB (Fédération Esperanto Bretagne). Luarlandoj kun Kantumi el Le Mans kaj kelkaj kantemuloj kaj grava helpanto el Angers. Pariza regiono kun Kantilie, Normandio, Sudokcidento. El tiuj du lastaj regionoj, nur kelkaj gekantemuloj plej ofte laboras sole per interreto. Bruselo eĉ, unu sopranino rete kantadas.

LME : Kial vi sentis la bezonon de tia asocio ?

FL : Dum chiuj kongresoj mi rimarkis

omaĝo al Georges Lagrange, kiu tradukis plurajn poemojn.

La gekantistoj ankaŭ proprigas al si la muzikan kulturon de la aliaj kaj pli riĉigas la sian.

LME : Ĉu vi celas ankaŭ aligi homojn aŭ korusojn de aliaj regionoj de Francujo (ol tiuj kiuj jam estas) ?

FL : Jes kompreneble, jam pluraj gekantemuloj el Alzaco, Loreno kaj Pireneoj petis de mi informojn por organizi grupojn en siaj regionoj. Daŭrigota... Post la somero estos alia kultura jaro. Jam mi ŝatus cerbumi alian grandan projekton sed unue plibonigi, kreskigi "Kanto ĝenerala". Ekzistas ankaŭ kelkaj tradukendaj poemoj. Alvoko al kandidatoj !

LME : Kiuajn planojn vi havas pri Interkant' ? Kian repertuaron ? Provludoj ? Cele al prezentoj kie ? En kiuj

artpotencialojn. Eblas dum la internaciaj vesperoj de UK-j. Se ni antaŭvidas, se ni prilaboras imponan projekton dum kelkaj jaroj, se ni donas al Francio esperantan koruson, ni tiele denove montros ke Esperanto posedas kulturon. Tiu spektaklo iĝus montrofenestro pri esperanto alimédie, alilande.

LME : Ĉu vi ekzemple antaŭvidus renkontiĝon kun aliaj esperantaj korusoj eksterlande ?

FL : Se ekzistas sama kant'asocio alilande, renkontiĝo fariĝos necesa. Imagu, ie, la "esperantaj choralies"... Alia rimarko : esperante kanti vere estas efika maniero por lerni kaj uzi esperanton, ĉefe tiamaniere mi lernis ĝin.

LME : Dankon pro viaj respondoj !

Ora monato en **Finlando**

Dum septembro 2008, “ranskalainen pelimanni” (franca folkmuzikistino) havis revan vojaĝon dank’al Esperanto-Asocio de Finnlando kaj siaj finnaj geamikoj. Mi vizitis 7 urbojn kaj 2 kamparajn areojn. Mi koncertis 13 fojojn, plejparte publike, en Turku, Pori, Tampere, Uudispira kaj Vesanto. Mi ankaŭ akordionumis dum kafopaŭzo de seminario pri maljunuloj kaj kulturo en Rauma. Ĉiufoje publiko aprezis la proponitan vojaĝon tra la mondo pere de lingvoj kaj muziko (14 lingvoj inter kiuj Esperanto kompreneble). Kelkaj neesperantistoj poste decidis lerni Esperanton : en Turku kaj Vesanto (3 !!). Vidu, la landa asocio ne vane malŝparis monon, paginte miajn vojaĝkostojn tra Finnlando ! Mi partoprenis al Aŭtunaj Tagoj en Heinola, pri kiuj mi jam parolis en



alia teksto.

Mi ankaŭ vizitis lernejojn : en Laitila, Tampere (“suburbo”), Martikala (Iisalmi) kaj Ahveninen (Vesanto). En la du unuaj estis 400 infanoj. La koncerto okazis en gimnastejo, unue mi timis ĉar en mia lando kiam

infanoj kunvenas po multe, ili tuj estas moviĝemaj kaj brucemaj. Sed en Finnlando, ili lernis klarajn regulojn kaj respekton (laŭ mi...).

Mi sukcesis lerni kelkajn frazojn en la finna, post kelkaj koncertoj

Do ĉiufoje ili kviete vice eniris en la vastan halon, kviete sidiĝis kaj aŭskultis mian koncerteton. Loka esperantisto tradukis mian prezentadon, kvankam mi sukcesis lerni kelkajn frazojn en la finna, post kelkaj koncertoj. Estis bonega okazo montri realan efikon de nia lingvo, ĉu al infanoj ĉu al instruistoj. En la du lastaj lernejoj, infanoj havis okazon fari demandojn post la muzikprezento (dum kiu mi uzis lernejan eŭropan mapon, petante de infanoj ke ili montru kie situas la lando de kie venas venonta kanzono). Estis ege interesa sperto : demandoj estis tre diversaj (ĉu vi havas alergion ? Kiel estas vivi en Francio ? Kiu estas via plej ŝatata finna televidprogramo ? Kiun senton vi havas kiam vi alvenas en lernejo por ludi ?...). Plaĉis al mi bildigi diversecon de nia mondo. Do, dank’al EAF, proksimume 900 infanoj aŭdis esperanton en muzika kaj afabla etoso !



Mi havis tempon sperti ĉiutagan etoson

Unue ĉar ege bone organizita de la EAF-estraro : 2 aŭ 3 tagoj en ĉiu urbo, koncerto kaj laŭplaĉa vizito de la urbo kun loka esperantisto. Tiel mi havis tempon sperti ĉiutagan etoson ĉie kien mi iris, ne estis maratono !

Due, ĉar oni ĉie kore, varme, akceptis kaj gastigis min. Neniam mi min sentis sola, fore de mia familio, aŭ kontraŭe, kiel oficiala gasto. Ĉie, amikeco rendevuis, kvankam ni plejparte unuafoje renkontiĝis.

Mi malkovris belegan naturon

Trie, ĉar mi ricevis eblecon konatiĝi kun pluraj medioj kiuj aparte gravas por mi : tradicia muziko, edukado kaj naturo, kaj kuirarto, historio, ktp.! Mi plurfoje renkontis muzikistojn kaj konstatis ke muziko estas ege grava afero en Finnlando. Oni klarigis al mi kiel funkcias finna eduksistemo.

Mi malkovris belegan naturon en pluraj partoj de Finnlando. Suno plejofte origis buntan aŭtunan pejzaĝon, vespere lagoj respegulas ĉielon, tiel ke vi ne scias kie estas ĉielo, kie estas akvo. Ruĝa luno, tiel granda kiel mi neniam vidis, gvidis nin dum veturado inter Heinola kaj Iisalmi (poste dum du vesperoj mi atendis ĝin por admirigi ĝian leviĝon super la lago). Remboate promeni sole sur finna lago en ora lumo estas neforgesebla sperto. En arbaro, mi ne renkontis barbarojn sed barbarbojn. Longaj likenoj pendas el abiaj branĉoj, dika musktavolo kovras grundon, mi eĉ fulmvidis koboldon... Kaj en Syvälahti, ĉiutage cignoj organizis por mi malsimilan spektaklon; en vasta kampo, ili kunvenis grupe (komence, ili estis 27, post dek tagoj ni nombris 45 el ili !) kaj alvenas fluganta paro : ĉu ili akceptos ilin ? Ne ĉiufoje, okazis ordiga batalo... Iliaj krioj sonadis super arbaro, kie homa bruo maloftegas.



Mi realigis multjaran revon

Kvare, ĉar mi realigis multjaran revon, dank'al Kimmo kaj Hillevi, mi lernis vimenan plektadarton. Mi ankaŭ iomete helpis al vimenrikoltado (nur iomete, ĉar ni havis tiom alian por fari!), kaj precipe ĝuis kampanan vivon en Savoregiono. Kimmo organizis plurajn koncertojn, en teatro, lernejo, maljunulejo, vendejo (kie mia "salajro" estis fumigita salmo !).

Vilaĝanoj donacis al mi tradician segilon kiun mi uzas por varmigi min !

Mi ĝuis vilaĝan vesperon, en bela malnova farmobieno, dum kiu pluraj homoj kantis, kaj vilaĝanoj donacis al mi tradician segilon : ĉar ĝi same grandas kiel mia valizo, ni enpakis

ĝin sur la valizo, uzante multe da glubando : feliĉe, neniu demandis klarigojn en fluĝaveno ! Kaj nun mi uzas mian savoan segilon por varmigi min kaj mian domon !

Foriro estis malgaja, kvankam hejme atendis min familio. Sed mi revenos, certe... ne tiel baldaŭ kiel sovaĝaj cignoj, sed same certe !

Nu, pere de Esperanto mi malkovris landon pli profunde ol se mi estus simpla turisto. Mi ankaŭ ricevis eblecon praktiki mian metion eksterlande, koncerti. Plua pruvo ke Esperanto ne nur estas utopio, fantazio, hobbio aŭ lingvo de eta fanatikularo, sed vera ilo por ĉiutaga vivo, laboro, kaj mirinda ebleco por sin malfermi al alia socio, alia kulturo.

Fransŭaz' Rochette, oktobro 2008.